


# Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

**1970** **6**

# KULTURAJ KAJEROJ

1970 NOVEMBRO - DECEMBRO

## Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| **El Gresillon** | |
| **Esperanto tra la mondo** | A. Frangeul |
| **Tra Suda Germanujo** | |
| **La Sekretaj Societoj (fino)** | E. Motillon |
| **Iri sur la Lunon ?** | |
| **Je kio tio utilas ?** | |
| **Ludwig van Beethoven** | |
| **Du Poemoj** | Pavlo Tyĉina |
| **2 beboj en maŝino** | |
| **Por via Distro Nia konkurso** | P. Chevalier |

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

*Kulturaj Kajeroj* deziras al siaj geamikoj

ĉion bonan por la jaro 1971

# El Grésillon

La U.K. de U.E.A. okazos en Londono. Samtempe, en Parizo, S.A.T. kongresos. Do multaj gesamideanoj el la tuta mondo havos okazon viziti nian landon. Multaj el ili vizitu ankaŭ Gresillon. Ni estas certaj, ke ni revidos malproksimajn amikojn, kiuj de longe ne iris la vojon al Baugé, kaj gesamideanojn, kiuj ankoraŭ ne konas la kastelon. La programo nun preta, estos tiel interesa, kiel la antaŭajn jarojn, kiam niaj eksterlandaj gesamideanoj multe ŝatis la kursojn, la prelegojn, la ekskursojn, la etoson.

Oni ne kredu, ke niaj kursoj adresiĝas nur al francoj. Ĉiujare kelkaj eksterlandanoj ĉeestas ilin. Ni ŝatus, ke ili estu pli multaj ĉar internacian lingvon oni devus lerni en internacia kurso. Tio eblas en Gresillon, ĉefe koncerne la perfektigan kaj la superan kursojn. Ni opinias, ke la Seminario por kursgvidantoj, kiu ĝis nun arigis nur kelkajn francojn plivaloriĝus per la ĉeesto de ne-francaj interesatoj. La gvidadon de kurso oni ne povas lerni nur teorie. En Gresillon estas eble ĝin lerni praktike ĉar paralele okazas porkomencanta kaj praktika kursoj. Ni estas pretaj organizi eĉ kelkajn pedagogiajn kursojn dum la unua periodo de julio se tio interesas sufiĉe da personoj. Ni do atendas viajn sugestojn pri tiaj kursoj.

**ESPERANTISTA KULTURDOMO**
**« GRESILLON »**

**NIA PROGRAMO**

**En Aprilo**
(4.4 - 9.4).
10-a paska kultura semajno de U.F.E.

**Dum la Somero**
( 3.7 - 24.7) Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.
(24.7 - 7.8) Kulturaj kaj turismaj internaciaj Ferioj.
( 7.8 - 14.8) Postkongreso de S.A.T.
(14.8 - 5.9) Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.

**Ekskursoj** al la kasteloj de la Loire, Angers, Nantes, la nokta spektaklo de la kastelo de Le Lude.

Petu tuj informojn :

Esperantista Kulturdomo
Kastelo Gresillon
49 - BAUGE - Francujo

# Esperanto tra la Mondo

### S.A.T. KONGRESO EN PARIZO :

La 44a kongreso de S.A.T. okazos en Parizo de la 31a de Julio ĝis la 6a de Aŭgusto 1971. Ĝi solenos la 50 jarojn de S.A.T. kaj okazos en la Sciencfakultato de Orsay. Tri postkongresoj estos organizitaj : unu en Gresillon, la dua en Les Houches (Alpoj), apud Chamonix, la tria en Balaruc-les-Bains (nur por tendumantoj). Petu informojn kaj aliĝilojn al O.K.K., S.A.T. 67, avenue Gambetta, PARIS-20a. Francujo.

### LA 12-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO DE U.E.A. :

Ĝi okazos de la 30-7 ĝis la 6-8. 1971 kun aldona libervola restado (6-8 — 13-8) en St. Mary's Bay School Holiday Center, Romney Marsh, Kent (Britujo). La principa limdato por aliĝo estas la 30-a de Aprilo 1971. Tiu Kongreseto estas nepre rezervita al infanoj de 6 ĝis 16 jaraj.

### KUBO KONSIDERAS ESPERANTON :

La Kuba Ministerio por Edukado nun esploras proponon instruigi la internacian lingvon Esperanto « en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj » de la lando. Kvankam en 31 landoj instruas la internacian lingvon diversaj nombroj da lernejoj, Kubo, se ĝi efektivigus la proponon, estus la unua ŝtato, kiu instruigus la lingvon en ĉiuj siaj lernejoj.

### SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO :

Oni scias ke Universala Esperanto Asocio sugestas al niaj Esperanto-Kluboj aranĝi ĉiujare « Semajno de Internacia Amikeco » (legu pri tio la artikolon en « Esperanto » de Oktobro). Tiu semajno, kiu okazos en 1971, inter la 21a kaj la 27a de Februaro, devas krei eblecon kunlabore agadi kun neesperantistaj organizoj. La respondeculo estas S-ro Erik Carlen komisiito de U.E.A. por « S. I.A. ». S-690 60 Hallabrottet, Svedujo.

### LA LINGVA PROBLEMO EN U.N.E.S.C.O. :

Antaŭ kelkaj monatoj, la gazetoj informis nin ke la administrativa konferenco de U.N.E.S.C.O. adoptis proponon por ke Araba Lingvo estu, ekde 1974, la **KVINA** labora lingvo de U.N.E.S.C.O. malgraŭ la sindeteno de landoj kiel Usono kaj Francio, kiuj grandparte devos pagi la elspezojn (899.156 dolaroj por du jaroj). Sen komentario !...

### SKISEMAJNO ESPERANTISTA EN FRANCIO :

Skisemajno Esperantista okazos en La Toussure, je 16 km. de Saint-Jean-de-Maurienne, en lignodomo, inter la 6a kaj la 13a de Februaro. Skribu al S-ro Vianey Harpet, 3, rue Sébastien-Gryphe, 69-Lyon (7e). Francujo.

### SOVETA RADIO EKUZAS ESPERANTON :

Antaŭ 2 jaroj en Litova S.S.R. oni ekinstruis la internacian lingvon Esperanto en 19 lernejoj, kiel unuafojaĵo en postmilita Sovet-Unio. Nun en Estona S.S.R. okazis simila novaĵo en la fako radia. Estona Radio septembre disaŭdigis la unuan programon en Esperanto kaj poste decidis regule plu elsendi esperantlingve al la eŭropaj landoj. Per tiuj programoj Sovet-Unio iĝas la 10-a lando nuntempe disaŭdiganta regulajn radiajojn en la internacia lingvo.

### KONTRIBUU AL LA SUKCESO DE ESPERANTA FILATELA EKSPOZICIO JUNULARA KIU CIRKULOS EN FRANCIO :

La Esperanto-Klubo en Angers (Francio), en kunlaboro kun la loka filatela Societo, preparas vastan originalan ekspozicion por la printempo de 1971. Jen Pri kio temas :

— Partoprenantoj : Esperantistaj gejunuloj inter 8 kaj 18 jaraj, aŭ neesperantistaj junuloj, sed gvidataj de esperantistoj.

— Kion sendi ? : Poŝtmarkojn aŭ seriojn de poŝtmarkoj (prefereble stampitaj) filatele kaj konvene fiksitaj (minimuma formato : 13,5 × 10,5 cm).

— Kiu (j)n poŝtmarko(j)n sendi ? : Poŝtmarko(j)n karakteriza(j)n de **Via** lando.

— Supre indiku Nomon, adreson, landon de la partoprenanto.

— Sub la poŝtmarko(j), NEPRE EN ESPERANTO skribu aŭ tajpu kelkajn liniojn kiuj klarigas la bildon de la poŝtmarko(j).

— Se eble lasu blankaĵon tute malsupre por la traduko en francan lingvon skribotan de la esperantistoj en Angers.

— Afranku filatele, se eble, la sendaĵon.

— Limdato por la ricevo de la sendoj : I-a de Marto 1971.

— Adreso por la sendoj : S-ro Frangeul, 42, rue Pré-Pigeon, 49-ANGERS. (Francujo).

Interŝanĝe la sendintoj ricevos ekvivalentajn francajn poŝtmarkojn aŭ unuatagan koverton pri « tago de la poŝtmarko » 1969.

### ITALA KONGRESO SUR ŜIPO EN MEDITERANEO :


Konvenas substreki la sukceson de la nacia kongreso de Esperanto kiu okazis dum septembro sur la ŝipo « Caribia ». 325 Kongresanoj, inkluzive la 102 ne italaj esperantistoj el 16 landoj, enŝipiĝis kun la neesperantistaj pasaĝeroj. Laboraj tagoj kaj turismaj ekskursoj en la diversaj vizititaj landoj estis same sukcesaj.


Nova pruvo ke turismo devas esti unu el la plej gravaj agadaj kampoj de nia movado en niaj modernaj tempoj. Kiam ekzistos unu « Grésillon » en ĉiu eŭropa lando ?

### JAM PRI LA KONGRESO... 1972 ! :

En 1972, la universala kongreso okazos en Portland (Usono). U.E.A. antaŭvidas flugan karavanon rekte Amsterdam-Portland, inter la 26a de Julio 1972 kaj la 20a de Aŭgusto. Rilatu jam nun kun F-ino Vermaas, en U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam — 3 002 — Nederlando.

# TRA SUDA GERMANUJO






Kiu intencas vojaĝi en Suda Germanujo, en tiu montara regiono ĉirkaŭ Munchen, tiu devas unue elekti kiun aspekton de tiu riĉega regiono li preferas, ĉar verŝajne li ne havos tempon por ĉion ĝui.

Se li ŝatas belajn pejzaĝojn kun sovaĝaj montoj kaj mirindaj arbaroj, jam tiu regiono estos por li paradizo.

Ankaŭ ege allogaj estas la romantikaj urboj kun siaj muzeoj kiel en Munchen kaj kun siaj koncertoj kiel en Bayreuth. Sed nura vizito al la kasteloj estas jam vojaĝo al la limoj de fantazio, beleco, strangeco. Unu el la plej famaj el tiuj kasteloj estas la kastelo de Neuschwanstein. Konstruita sur kruda roko, apud lago ĝi estas vera konkretigo de ne-realeco ! En ĝi la ĉambroj provas speguligi la teatran atmosferon laŭ Wagner-a maniero : ĉu unu el tiuj ĉambroj ne similas naturan groton por memorigi la legendon de Tannhauser ?



Sed oni ne devas forgesi ke tiu alloga lando havas tre afablajn enloĝantojn kaj, ke, en ĉiuj okazoj oni estos en agrabla etoso por viziti Sudan Germanion.

# La Sekretaj Societoj

## (fino)

### LA INICAJ SOCIETOJ.

Ĝenerale, tiuj societoj ne plu estas sekretaj laŭ la plena signifo de tiu vorto. Nia epoko fariĝis sufiĉe tolerema — almenaŭ en multaj landoj — por ke ĉiu povu konfesi proprajn opiniojn. Tial la aŭtentikaj inicaj societoj ne plu kaŝas sian ekziston. Ili funkcias tute konforme al la leĝoj. Kelkaj eĉ faras propagandon per anoncoj, afiŝoj, publikaj prelegoj, k.t.p. Kelkaj ankoraŭ akceptas membrojn nur per alelektado. Ne ilia ekzistado estas sekreta, sed iliaj instruoj kaj kunvenoj estas strikte rezervataj al iliaj membroj.

Inica societo estas societo, kiu « investas inicon » al siaj membroj. Kio do estas *inico*? La populara kredo, ke ĝi estas stranga ceremonio, kiu donas al la inicato mirindajn, magiajn aŭ miraklajn povojn estas nura superstiĉo. Inico estas atingo de saĝo, de supera konsciostato ; ĝi estas leviĝo al pli altaj ebenoj mensaj, intelektaj kaj spiritaj ; ĝi estas pli plena realigo de la « memo ». Tio ja estas akirebla nur per longa mem-trejnado kaj postulas severan memdisciplinon. La inicaj ritoj nur celas helpi al tiu atingo per apliko de la psikologiaj leĝoj. Krom tio, inicaj societoj havas aliajn komunajn trajtojn : ili sin nomas « frataroj », ili estas mistikaj kaj ili riferencas al tre antikva tradicio, tiel malnova kiel la civiliza mondo.

La « Plena Vortaro » difinas la vorton « mistiko » tiel : « Religia aŭ filozifia doktrino kaj metodo kontraŭa al raciismo kaj celanta ekkoni per sento, imago eĉ ekstazo, se ne per intelekto, la veron kaj precipe la diajn kaj postmortajn misterojn ».

Tiu difino estas nur parte ĝusta. Ĉar mistiko tute ne estas kontraŭa al racio. La mistikuloj asertas, ke la homo posedas aliajn kapablojn krom la korpaj, mensaj kaj intelektaj. La celo de mistiko estas disvolvigi tiujn aliajn kapablojn, same kiel la raciajn, por trafi plenan evoluon. Cetere, moderna scienco, iel konsentas pri tio, kaj agnoskas tiajn studojn laŭ la nomoj : psikanalizo, ekstersensa percepto, telepatio, k.a.

### LA LERNEJOJ DE MISTEROJ.

La historiistoj informas nin, ke ĉirkaŭ la jaro 1350 antaŭ Kristo, faraono Amenhotep IV de la 18a dinastio provis anstataŭi la politeisman kredon al multaj dioj per la kulto de la Unika Dio, Aton. Pro tio, li ŝanĝis sian nomon kaj alprenis tiun de « Aĥnaton » (servanto de Dio). Li malsukcesis. Tial li komisiis elektitajn disĉiplojn sekrete daŭrigi lian instruon. Tiel komenciĝis la famaj « Lernejoj de Misteroj ». Ĉiuj grandaj grekaj filozofoj, Sokrato, Platono, Pitagoro, k.t.p. iris en Egiptujon kaj tie ricevis inicon. La Orfeaj kaj Eleŭzinaj Misteroj, kiuj ludis tiom gravan rolon en la tiutempa civilizo, havis sian originon en la instruoj de tiuj unuaj mistikaj egiptaj lernejoj.

La grekaj filozofiaj skoloj estis ankoraŭ potencaj, kiam aperis Kristanismo. La nova eklezio devis longe batali kontraŭ ili por atingi superecon.

### LA GNOSTIKANOJ.

Ekde la naskiĝo de la nova religio, ekzistis grupoj de mistikuloj, kiuj konfesis esoteran kristanismon konata laŭ la nomo « Gnostiko » laŭ la greka vorto « gnôsis », kono. Tiuj grupoj ne estis kunorganizitaj sed estis fakte apartaj sekretaj societoj. Ilia doktrino estis bazita sur la publikaj instruoj de Jesuo, kaj ankaŭ sur sekretaj instruoj, kiujn li estus doninta al siaj disĉiploj. Ili estis rekte influitaj de la egiptaj lernejoj de Misteroj, ĉar, diris la Gnostikanoj, Jesuo estis inicita dum sia kaŝita vivo en la egiptaj lernejoj. En la gnostika doktrino, oni trovas ankaŭ influojn de orientaj, persaj kaj juda religioj. Eklezio kontraŭbatalis Gnostikon dum tri jarcentoj, antaŭ ol ĝin venki. Sed ĝia influo estas videbla en Kristanismo kaj en modernaj filozofiaj sistemoj.

### LA ISLAMANOJ.

La religio predikita de Muhammad (Mahometo) rapide disvolviĝis. Ekde la komenco fondiĝis esoteraj sekretaj societoj. Nuntempe, ekzistas ankoraŭ ne malgranda nombro de tiaj societoj, kiuj interpretas la « Noblan Koranon ». La ĉefaj estis la Sufioj kaj la Ismaelanoj ankoraŭ ekzistantaj. La unuaj, kvankam fidelaj al Korano havas doktrinon penetratan de Kristanismo. (Laŭ Korano, Jesuo estas la kvina profeto de la Vorto). Dum Mezepoko, ili famiĝis pro siaj sciencistoj, medicinistoj, teologoj. Ili diskonigis en la kristanan mondon la verkojn de Aristoto, kaj tiel nerekte influis la katolikan teologion.

La Ismaelanoj estas konsiderataj kiel skismuloj de la ortodoksaj Islamanoj, ĉar ili agnoskas unu sepan profeton aŭ « Imam » Ismael, filo de Dŝafer. Ili estas tre nombraj en Pakistano, kie loĝas ilia estro, la Agha-ĥan. Tri ĉefaj branĉoj naskiĝis el Ismaelismo. La Haŝiŝinoj, kies fondinto estis konata laŭ la kromnomo : « La Oldulo de la Monto ». Pro sonsimileco, ilia nomo fariĝis en Francujo : « ASSASSINS », kiu signifas : murdistoj. Tre potencaj dum la IIa kaj 12a jarcentoj, ili ŝajnas nun malaperintaj.

La Nasarioj loĝas en Libano, sed estas nun malmultaj. Ilia doktrino estas forte influita de gnostikismo.

La Druzoj loĝas plejparte en Libano. Ili parolas la araban lingvon, kaj estas islamanoj (almenaŭ ekstere). En realeco, ili havas sekretan doktrinon kaj kredaron, tre simila al tiuj de la grandaj inicaj societoj. Cetere, ilia interna organizo estas tre simila. Konsideri ilin kiel nur religia sekto ŝajnas eraro. Fakte, ili estas vera popolo. Oni ne povas fariĝi Druzo; oni naskiĝas Druzo. Ili kredas je reenkarniĝo, t.e. je la transiro de la animo en alian homan korpon post la morto. Ilia estro, princo Kemol Jomblat (pron : Ĝomblat) estas konstanta deputito por la Druzoj en la Libana Respubliko, kaj plurfoje estis ministro.

### LA MEZEPOKAJ SEKRETAJ SOCIETOJ.

La katolika Eklezio, post longa batalado kontraŭ la Romia Imperio kaj multaj skismoj fine firmigis sian superregadon en Eŭropo. La provoj por establi « Katolikan Imperion » tuteŭropan malsukcesis. Sed fariĝis kvazaŭa jura regulo la maksimo : « Cujus regio, eius religio » — kies reganto, ties religio — kio signifis, ke la reganto trudis sian religion al la regatoj. Tio klarigas la nun nekompreneblan maltoleremon, kiu subpremadis la penson ĝis la fino de la 15a jarcento. Unu konsekvenco estis la plifortigo de la jam ekzistantaj sekretaj societoj, kaj la naskiĝo de multaj aliaj. Mi parolos nur pri la pli gravaj. Kelkaj havis tre grandan influon. Nun estas pruvite, ke multaj eminentaj kaj potencaj homoj estis anoj de tiuj societoj.

## LA KORPORACIOJ.

La ĉefaj metioj, de jam longe, formis apartajn societojn zorge konservantajn siajn labor-sekretojn. Ili akceptis membrojn nur post longa provado metia kaj morala. Eniro en la societo kaj altiĝo ĝis la diversaj gradoj estis eblaj nur dank' al inicaj ceremonioj. La estroj aŭ « Majstroj » ricevis altan tre sekretan inicon. La inicaj metodoj kaj ritoj rekte devenis de la antikvaj lernejoj de Misteroj. Ili fariĝis leĝaj sub la nomo de « Korporacioj », sed estis ne nur profesiaj komunumoj, sed estis ankaŭ esoteraj societoj. Oni scias kiom potencaj ili estis. Fakte, dum pluraj jarcentoj, ili gvidis grandaparte ekonomion kaj politikon. Kiam oni admiras la senkomparajn ĉefverkojn postlasitaj de la « Majstroj-Masonistoj » kaj « Majstroj-Vitristoj », oni devas agnoski, ke tiuj homoj posedis eksterordinarajn konojn. La starigo de la romanikaj kaj gotikaj katedraloj, per nur tre primitivaj teknikaj rimedoj estas vera mistero por niaj modernaj arkitektoj.

La novaj kondiĉoj de evoluanta mondo tre malfortigis ilin ekde la 16a jarcento, kaj la franca Revolucio de 1789 ilin detruis.

## LA TEMPLANOJ.

Tiu famega societo de monaĥoj-militistoj fondiĝis en 1118 por la protektado de la pilgrimantoj al la Sankta Tombo. La Kavaliroj de l' Templo subtenis la kristanan reĝlandon de Jerusalemo kaj la krucmilitojn. La Islamanoj rekonkerinte la landon, la Templanoj devis forlasi Palestinon kaj Sirion., kie estas ankoraŭ videblaj iliaj imponaj fortikaĵoj. Sed la agado ne estis nur pormilita. Ili organizis modelan internacian bankan sistemon. Ili fariĝis la bankieroj ne nur de privataj personoj, sed ankaŭ de la Papo, de la ŝtatoj kaj de la reĝoj. Ili akiris fabelajn riĉaĵojn. Ili havis Komandejojn en ĉiuj eŭropaj landoj. Tiaj egaj potenco kaj riĉeco estis sendube unu el la kaŭzoj de la persekutoj, kiujn ili suferis. Ilia internaciemo estis kredeble alia kaŭzo, en tempo, kiam naskiĝis la nacioj. Ankaŭ, ili naskis ĵaluzon ĉe la aliaj similaj ordenoj. Fine la franca reĝo Filipo IV le Bel (la fortika aŭ la bela) sukcesis kondamnigi ilin de Papo Klemento V, ilia iama protektanto. La Templanoj estis arestitaj en tuta Francujo, kaj komenciĝis longa kaj malklara proceso, kiu finiĝis per la brulmortigo de la Granda Majstro, Jacques de Molay (ĵak de mole') kaj de multaj Kaviroj. Tio okazis en 1314 en Parizo. La akuzo estis pri « idolaneco, apostateco kaj hororaj diboĉoj dum sekretaj ceremonioj ».

Oni longe diskutis pri la demando, ĉu la Templanoj havis esoteran doktrinon. Tio ŝajnas pruvita. Tamen, pro manko de dokumentoj, la opinioj de la historiistoj estas ankoraŭ malsamaj.

## LA KATAROJ AŬ ALBIANOJ.

En Bulgario, dum la 10a jarcento, iu pastro, popo Bogomil instigis reformon de la religio., kaj naskis skismon konata en tiu lando laŭ la nomo « bogolimismo ». La adeptoj pli malfrue sin nomis « Kataroj » laŭ la greka vorto : catharsis, (purigo). Ĉirkaŭ la fino de la 11a jarcento, tiu sekto enradikiĝis en suda Francujo. Ilia centro estis la urbo Albi ; pro tio, ili estis ĝenerale konataj laŭ la nomo : « Albianoj ». (france : Albigeois). Ili havis inicajn ceremoniojn kaj du gradojn : la « Aŭdantoj » kaj la « Puruloj ». Ilia doktrino fariĝinte danĝera antaŭ la okuloj de la Eklezio kaj de la Ŝtato, krucmilito estis ordonita de la Papo. Ĝi finiĝis en 1229 post dek jaroj de senkompataj bataloj, kruelaĵoj, rabadoj. Tiu movado reviviĝis antaŭ kelka tempo. En Parizo, societo eldonas revuon : « La Kataraj Kajeroj ».

### LA NUNTEMPAJ SEKRETAJ SOCIETOJ.

Nia epoko vidas egan disfloriĝon de pli malpli sekretaj societoj, eklezietoj, mistikemaj grupetoj. Oni povus kalkuli plurajn centojn da tiaj organizaĵoj grupigantaj de kelkdeko da membroj ĝis pluraj centoj. Mi nur parolos pri la kvar ĉefaj kaj tradiciaj.

## LA KOMPANOJ.

Post la Revolucio, la malpermesitaj korporacioj reviviĝis en la du frataroj de la « Kompanoj ». Tiuj du societoj, iam ofte malamikaj, akceptas nur metianojn elprovitajn per verkado de « ĉefverko » kaj morale senriproĉaj. Oni aliĝas al la membraro kaj al la « gradoj » per ritaj inicoj. Tiuj du societoj estas tre viglaj en Francujo kaj en kelkaj landoj de okcidenta Eŭropo. Ili ne plu estas malamikaj kaj unuiĝis konservante siajn proprajn doktrinojn, cetere tre similaj.

## LA FRAMASONOJ.

Tiu frataro estas la plej konata el la inicaj societoj en la okcidenta mondo. Ĝi originis en Anglujo ĉirkaŭ la fino de la 16a jarcento. Tie, la potenca korporacio de la Arkitektoj nomis sin : « Free-Masons, t.e. « liberaj masonistoj » ; france, oni diras : Francs-Maçons ». Pro sia malkreskiĝo, la societo pli kaj pli akceptis membrojn ekster la konstrua profesio. Fine, tiuj « akceptitaj masonistoj » (accepted masons) fariĝis la pli nombraj kaj la pli influaj. Necesis tuta refandiĝo de la organizo. Tio okazis en 1723. La nova societo ne plu estis « operacia » aŭ profesia, sed « spekulativa » aŭ filozofa kaj malfermita al ĉiu (escepte la virinoj). Kelkajn jarojn poste, ĝi aperis en Francujo, kie ĝi rapide, progresis, kaj disvastiĝis en aliaj eŭropaj landoj. Ĝi rapide turnis sin al esoterismo kaj okultismo.

Oni emfazis la rolon de la Framasonaro en la Franca Revolucio. Sendube, ĝi multe influis per la disvastigo de la humanismaj ideoj pri libereco kaj egaleco. Eĉ la Franca Respubliko alprenis ĝian moton : « Libereco, Egaleco, Frateco ». Tamen, multaj el la Fratoj estis viktimoj de tiu revolucio. Eĉ la Granda Majstro, princo Philippe d'Orléans, kromnomita « Filipo-Egaleco » estis senkapigita.

Dum la 19a jarcento, la francaj Framasonoj havis tre gravan rolon en la politiko de sia lando. Ili energie batalis kontraŭ la katolika Eklezio, rompigis la Konkordaton, forpeligis la kongregaciojn kaj estigis la « disiĝon de Ŝtato kaj Eklezio ».

Kvankam estante *unu frataro*, la Framasonaro ne estas centrigita organizo. Ĝi konsistas el « obediencoj », aŭtonomaj en ĉiu ŝtato sub la gvido de unu Granda Loĝio. En Francujo ekzistas kvar gravaj obediencoj kun malsama ritaro, el kiuj nur unu akceptas virinojn.

## LA ROZKRUCANOJ.

El ĉiuj inicaj societoj, la Rozkruca Ordeno AMORC estas kredeble la plej malnova kaj la plej universala. Ĝi estas nomata laŭ sia simbolo : kruco sur kies centro estas unu ruĝa rozo. Historie, oni konstatis ĝian ekziston ekde ĉirkaŭ 1350 antaŭ Kristo, dato de la fondo de la unuaj lernejoj de Misteroj. Ĉiam sub tiu simbolo kaj, kredeble, laŭ diversaj nomoj, societo de adeptoj daŭradis ĝis nia epoko. Ĝi havas branĉojn en la tuta mondo. Dum la 17a jarcento, ĝi faris mallongan publikan aperon, en Germanujo unue, poste en Francujo kaj en aliaj landoj. Ĉe la fino de la lasta jarcento, ĝi reorganizis sin publike. Ĝiaj branĉoj nomataj « juridikcioj » ne ekzistas laŭ naciaj kadroj, sed laŭ lingvaj teritorioj. Ĉar la rozkrucanoj konsideras ke, ĉiuj homoj estas egalaj, kia ajn estu ilia raso aŭ sekso. Ĉiu juridikcio estas gvidata de unu Granda Loĝio ligata al unu « Superega Granda Loĝio », kiu kontrolas la agadon de la ordeno en la tuta mondo. Ekzistas lokaj grupoj nomataj : pronaoj (greke : pronaos, antaŭtemplo, vestiblo), kapituloj kaj loĝioj. La instruado, kies fina celo estas inico, disdoniĝas al la membroj laŭ duobla maniero : per sekretaj « monografioj » studataj hejme kaj private, kaj per paroladoj, prelegoj en la lokaj grupoj. La instruoj estas duaspektaj : praktika kaj scienca studo de la naturaj leĝoj, ĉiam kun facilaj eksperimentoj, kaj mistika, esotera studo. Ili entenas 12 gradojn. La rozkrucanoj posedas tre modernajn laboratoriojn, ampleksajn muzeojn kaj bibliotekojn, unu planetarion, k.t.p.

## LA DRUIDOJ.

La mistera scienco de la Keltoj estis ŝajne komplete detruita de la Roma Imperio. Tamen, ĝi estis sekrete konservata. Ĉe la komenco de nia jarcento, la Druidoj reviviĝis, kaj organizis sin en la Keltaj popoloj : Irlandanoj, Skotoj, Kimroj kaj Bretonoj. Sed kvankam iliaj instruoj estas ligitaj al la plej antikva tradicio kaj, esence estas la sama kiel tiu de la aliaj inicaj societoj, ili tute ne havas universalan karakteron. Paul Bouchet (buŝe'), « Druido Bod Koad », « Granda Druido de la Gallaj landoj », tiel difinis la doktrinon :

« Druidismo difiniĝas kiel estante la esprimon de ĉiuj fortoj psikaj, intelektaj kaj fizikaj agantaj super tiu ĉi parto de la okcidenta mondo kie ili naskiĝis (la Keltaj gentoj) kaj pli precize super tiu Kelta raso modelita de tiuj influoj ».

Tio ne signifas maltoleremon kontraŭ la aliaj filozofiaj aŭ inicaj sistemoj, kies valoron ili tute agnoskas, sed precizigas Paul Bouchet : « La Druidoj deklaras, ke ilia doktrino estas la sola tute adaptita al la spirito de la Keltoj, konsiderata kiel la esprimo de la Fortoj agantaj super tiu parto de la mondo rilate al la Kosmo. »

La esenco de tiu doktrino estas koncize esprimata en 81 « triopoj » aŭ sentencoj, ĉiu prezentanta unu principon laŭ unu triunuo de aspektoj.

Tiu artikolo ne pretendas elĉerpi tiun ampleksan temon de la sekretaj societoj ; tutaj volumoj ne sufiĉus. Mia celo estis nur doni al la leganto ĝeneralan kaj objektivan scion pri nekonata aŭ miskonata flanko de nia civilizo, kies influo estis — kaj eĉ nun estas, tre grava.

E. MOTILLON.

# Iri sur Lunon ? Je kio, tio utilas ?


En julio kaj novembro 1969 Apolo 11 kaj Apolo 12 rapidegis al sia rendevuo kun Luno. Tiu sperto, la plej ambicia, kiun la homo travivis, okazigis sur Tero viglan debaton. Temas pri veraj signifo kaj graveco de spaca esplorado.

Antaŭ 12 jaroj, en 1957, U.S.S.R. jam inaŭguris spacan eraon, forĵetante Sputnikon sur teran orbiton. Usono dediĉis 44 miliardojn da dolaroj al siaj spacaj programoj, inter kiuj 24 miliardoj por Apolo-projekto.

Kelkaj centmiloj da eminentaj sciencistoj kaj teknikistoj kunigis siajn klopodojn : estis la plej giganta taĉmento mobilizita cele al tiu nura entrepreno.

Tamen oni daŭre demandis kaj demandas sin ĉu tiu vojaĝo estas vere necesa ?

Arnold Toynbee, fama brita historiisto esprimis la skeptikecon kaj la maltrankvilon de multaj seriozaj homoj, por kiuj allunado konkre-



tigas la grandegan ekarton, kiu estas inter teknologio kaj ĉiutagaj moroj. Toynbee tiadire protestis : « Vojaĝo al Luno estas tute simila al konstruo de Piramidoj aŭ de Versajla Palaco. Skandale estas tion fari dum tiom multe da homoj ne havas eĉ necesaĵojn. Se vi estas tiel lertaj por atingi Lunon, ĉu vi ne hontas tiel malbone regi la homajn problemojn ? »

Aliaj insistas pri la fakto, ke konkero de Spaco, naskante novajn strukturojn por la administrado de grand-skalaj entreprenoj, malfermas vojon al granda ofensivo de la homo kontraŭ materialaj aŭ socialaj problemoj, kiuj ankoraŭ staras sur nia planedo.

Sir Bernard Lovel, direktoro de la Brita Observatorio Jodrell Bank, konstatas, ke la « Kolektivoj », kiuj progresigis la Civilizacion, estas nur tiuj, kiuj frontis problemojn preskaŭ nesolveblajn kaj situantajn ĉe la ekstrema linio de teknikaj ebloj. De la tago, kiam ĝi ĉesis esti « progresema » la Roma Imperio defalis, kaj ĝia ekzemplo ne estas la nura ».

Antaŭ 500 jaroj, en Hispanio, Reĝino Izabela devis fronti samajn problemojn, kiam ŝi vendis siajn juvelojn por havigi al si la necesajn monrimedojn, kiujn Kristoforo Kolombo bezonis por sia vojaĝo al « Hindio ». Sendube ŝi nur revis pri la gloro kaj la riĉeco, kiuj sendube estus rezultontaj, por Hispanujo, de tiu vojaĝo. Sed la ĉefaj rezultoj de tiu historia aventuro estis nek la oro kaj la spicaĵoj alportitaj sur la hispanaj galionoj, nek la vastegaj teroj ĵus malkovritaj, kiuj igis Hispanion la unua Granda Imperio en la tiama mondo. Multe pli grava estis la fakto, ke la esploradoj de K. Kolombo malfermis novan ciklon de la mondo-evoluado, donante al homo majstrecon super la maroj kaj kunigante en unikan kolektivon — por la plejmalbono kiel por la plejbono — la tuton de la homa gento.


Oni povas pensi, ke, hodiaŭ, dum la homo aventuriĝas en la nekonatajn spacojn, analoga sperto atendas nin.

Kompreneble la spektinda flanko de allunado koncentris atenton de la tuta mondo sur la heroaj aspektoj de tiu realigo : ĉiuj rigardoj estas por la astronaŭtoj, tiuj ĉampionoj de la nova interplaneda Olimpiado kaj por la senpeka kondutado de la spaca veselo, tiamaniere ke oni iom forgesas la veran gravecon de la spaca esplorado.

Certe tiu ĉi donas novan amplekson al novaj riĉofontoj, kies naturo mem estas ankoraŭ ne konata, kaj permesas esperi solvon al tiu problemo : ĉu estas vivo sur aliaj planedoj ?

Sed kio pli multe gravas estas la Teknologia Renovigo : grandega kvanto da novaj teknikoj naskiĝis en tiu unua dekado de spaca esplorado. Ĉiufoje kiam la homo faris malkovrojn pri la ĉielo, la civilizacio faris gigantan paŝon antaŭen ; 3-4 jarmiloj da homa sperto permesas al Homo liberiĝi je gravito, kiu ĝis nun ligis lin al Tero ! Finfine ! Elirante el la tera atmosfero li

aldonis al sia natura medio kaj al sia propra naturo novan dimension preskaŭ senliman... Hodiaŭ la spaca esplorado, sendube la plej sensacia el la homaj aventuroj, certe alirigas nin al nova etapo de la Civilizacio !




Margaret Mead, amerika etnologo, tiamaniere klarigis tiun penson : « Tuj de la momento, kiam oni demandas sin, ĉu vivo estas ebla alie ol sur Tero, ĉu estas aliaj lokoj koloniotaj, ĉu alie ekzistas vivantaj estaĵoj, estas la ekzakta rango de la Homo en la Universo, kiu estas denove pridiskutenda. Ĉio estas ŝanĝita : dum tio notinde malaltigas la arogantecon de la homa gento, kontraŭe tio pliampleksigas ĝiajn eblecojn laŭ kolosaj proporcioj. Same kiel la esploroj de K. Kolombo tute modifis la tiaman politikan geografion, tiel same la Spaca Erao modifos la geografion kaj la politikajn instituciojn de nia hodiaŭa mondo. Oni ne povas pensi, ke la nuntempa « Nacio-ŝtato » kiu jam tiel malbone kontentigas la homajn postulojn en tiu dua duono de nia jarcento, efike respondos al la Spacaj Projektoj de la Homo.

La vojaĝo sur Marson unue projektita por la jaroj « 70 » alterne décidita kaj prokrastita ŝajnas tro multekosta por nura USONO aŭ nura U.S.S.R. Sin asociante por realigi tiun spacan Konkeron, projekto inter aliaj, ambaŭ potenculoj povus kooperi en la sektoroj, kiuj la plej malmulte kontraŭus apartajn morojn kaj profitojn ; ĉar en nia nuntempo la planedaj problemoj iĝas unuecaj sekve la unuopaj interesoj malaperos malantaŭ la komuna kooperado por Spaca Esplorado, kiu tiamaniere ricevos novan pulson, nepre internacian.

Le Courrier de l'UNESCO.
(Marto 1970).

# LUDWIG van BEETHOVEN

## 16-a de Decembro 1770 - 26-a de Marto 1827



Tiu genia muzikisto estas unu el tiuj gigantaj figuroj kiujn la homaro havas la eblecon koni kaj admiri nur malofte.

Li naskiĝis en Bonn (Germanujo) antaŭ 200 jaroj, en familio de muzikistoj. Lia patra avo estis nederlandano.

En 1782 (li do havis nur 12 jarojn) estis eldonitaj liaj unuaj komponajoj, sed li jam estis studinta la muzikon ek de la aĝo de 4 jaroj. Liaj profesoroj estis unue lia patro, poste tre famaj muzikistoj kiel Mozart kiun li renkontis en Wien en 1787, kaj Haynd.

En 1792, li transloĝis de Bonn al Wien kie li vivis ĝis sia morto en 1827.

Ne eblas ĉi-tie priskribi la verkojn de Ludwig van Beethoven tiom multaj kaj diversaj ili estas. Sed estas necese akcenti la originalecon de liaj komponajoj, ĉu ili estas simfonioj aŭ koncertoj. Kun li, klasika muziko iĝas ankoraŭ pli mirinda kaj sorĉa lingvo kiu esprimas la plej diversajn sentojn de la homoj.

Ĉu ne strange estas konstati ke li komponis kelkajn el siaj plej belaj melodioj post la jaro 1818 ? Ĉar ek de tiam li estis komplete surda, kaj tiu homo kiu tiel bone sciis komuniki kun la aliaj homoj per muziko ne plu povis partopreni normalan konversacion.

# *DU POEMOJ DE PALVO TYĈINA (1891-1967)*

### PLIVASTIGI AMIKECON

Mi el dom' eliris frue —
en okulojn sunradi' ...
Min salutas, flutsimila
oriola melodi' ...
Oriolon sekvas l'idoj,
lernas ĉiu debutant'
jen incitas, jen kartavas —
mistrafeta estas kant'
Apud domo kverko verda,
kaj post nefalĉita fojn'
Kreskas tiom sveltaj pinoj,
Ke al koro venas ĝoj'.
De Kijevo al Kijevo,
Supre, supre bluas voj'.
En ĉiel' aeroplanoj
bruas, kiel monta roj'.
Plivastigi amikecon-
nia celo. nia grac' !
... Venis hejmen mi hieraŭ
de l'Sesio por la pac'.

### PRUJNO

Hoj la vivo floris verde —
juno mia nigrobrova !
Mil' da ombroj, duontonaj...
Kion mi nuntempe trovas ?
Falis al mi griza prujno...
Griza, griza prujno...
Estas tio nemalbone.
Koro-lasu ! Ne protestu !
Antaŭ mi — jarcento nova.
Ni renkontu ĝin. Severe
pensas nun raci' eterna...
Estu prujno arĝentkolora —
Sed ne en animo mia !
Ĉe l'animo ĝermoj verdaj
de l'patrio bela nia.
Ja eĉ vintre pino-juna.
Freŝ-odore-juna...
Ĉu mi nure tintis liron ?
Ĉu en viv' bovide saltis ?
Tion mem popol' decidos.
Oni ŝatas la abelon.
Penso bonan agon vekas.
Agojn penso vekas.
Kiun prujno fortimigas,
tiu ĝojon ne renkontas.
Kiel seka sablo. Duno.
Mia koro ĉiam kantas.
Ja eĉ vintre pino-juna.
Freŝ-odore-juna...

1957

# "2 Beboj en maŝino"

Antaŭ kelkaj tagoj, matene, mi estis instalita en mia oficejo, okupiĝante je miaj ĉiutagaj okupadoj, kiam telefono vokis min.

Estis S-ro Langernaut, personar-estro.

— Permesu S-ro Le Gall, ĉu vi povas diri al mi ĉu viaj 2 infanoj estas ĝemeloj aŭ malsame aĝaj ?

Tiu demando ege surprizis min. Fakte, en mia ĉirkaŭaĵo, oni kutime konas al mi nur unu etan knabinon.

— Pardonu, S-ro Langernaut, respondis mi, sed vi devas fari erareton, ĉar nur unu infanon mi havas. (Jen por mi kontentiga okazo rebate silentigi tiun estron, kiu apartenas al tiu speco, kiu vante pretendas ĉion scii kaj ĉiam afektas superemän sintenadon).

— Unu nuran infanon ? diris li, surprizita, ke mi kuraĝis lin kontraŭstari, estas NEEBLE ! Le Gall, vi aŭdas, nepre neeble ! Antaŭ momento mi tion kontrolis. Por ni, vi havas 2 bebojn en maŝino !

Kiam, pasintan jaron, la Societo -kiu enoficigas min — aĉetis « komputilon » okazis granda elano de scivolemo. Post la instalado, en la vespero, la Ĝenerala Direktoro kunvenigis nin, por celebri, kun glaso ĉe mano, tiun eventon. Por la unua fojo, ĉiuj ni ĉeestis en la Konsili-ĉambrego, konsiderante kun ĝenata mieno la egegan metalebluan maŝinon ; ĝi fiksis nin per ĉiuj siaj agordoplatoj kaj ĝiaj maniloj starantaj kiel montro-fingroj ŝajnis jam minaci nin.

La Ĝenerala Direktoro, ridetanta kaj afabla, alparolis nin kun delikata ĝentileco, kiun, ĝis nun, li neniam uzis rilate nin.

Li diris, ke, de nun, nia vivo estos transformita kaj ke ni plene konscios vivi en la erao de « informatiko ».

La morgaŭon, ĉiuj estis « enmaŝinigitaj » ; ĉiu donis grandegan kvanton da informoj pri sia pasinta vivo, pri sia familio, pri siaj metiaj aspiroj. La « komputilo » registris ilin helpe de signoj + kaj, ilin asimilis, digestis, ĝis kiam ĉiu el ni fariĝis, sur monumenta bobenego, nur linio ekstreme fajna.

Ni eksciis, ke, sekve, dank'al tio, ĝi povus respondi al kiaj ajn demando pri ni mem en daŭro de unu miliardo de sekundo, eĉ eble ankoraŭ pli spontane (mi ne plu ekzakte tion memoras).

La sekvantan semajnon, letero de S-ro Langernaut informis min, ke pro enmaŝinigo de la pluaj-horoj-etatoj, mia kalkulo ĝis nun sub numero 486 iĝos 03-H-SUP-2 119-3, kaj bone estus, ke mi ĝin enkapigu.

Kelkajn tagojn poste, ricevante sian monatan salajran folion nia komisista junulo preskaŭ svenis : la proponita pago egalis la duoblon de la Societo Kapitalo.

Je la sama horo nia Ĝenerala Sekretario, responsa je la Ĝeneralaj aferoj kuntiris la brovojn, repuŝis sur sian fronton la okulvitrojn, konstatante, ke lia persona salajro — rabatendaj ŝarĝokostoj minusigitaj — plafonis je 13,06 F.

Verŝajne, estas de tiu momento, ke unuaj signoj de ia suspekto manifestiĝis kontraŭ nia « komputilo ».

Sola, nia Ĝenerala Direktoro al ĝi gardis estimon kaj amikecon. Tamen iom pli poste, lia fido preskaŭ ŝanceliĝis.

La Aferoj ne tiel bone prosperis, kiel li estis esperinta. Li kunigis la Konsilion kaj decidis demandi la Maŝinon.

Al tiu demando : « kiujn decidojn taŭgas preni ? » la Maŝino respondis (en malpli ol unu miliardo de sekundo — ĉar neniu deziras perdi tempon) : « Maldungado ! ».

Tuj la Sindikatoj kontestis la bonan funkciadon de la « komputilo ».

Sed la Direktoro, substrekante la fakton ke ĝi ankoraŭ estas « sub garantio » interrompis ilin per, al ĝi alia demando :

« Kiun maldungi ? » La respondo spontane eliĝis : « Ĝeneralan Direktoron ! ». Oni metis la aparaton sub observadon.

« Vi havas 2 bebojn en Maŝino ! ».

Mi havas kvietan karakteron kaj kutime suferas kontraŭaĵojn tute trankvilanime. Tamen mi konfesas : tio starigis en mi la unuajn simptomojn je incitado.

—« 2 beboj ! -ha ! S-ro Langernaut, vi ŝajnas tiel certa, ke vi en min preskaŭ enigis dubon » respondis mi kun iom da antaŭtimo en la voĉo.

Aŭskultu Le Gall, ne temas scii ĉu Mi estas certa pri tio, kion Mi diras, sed ĉu Vi estas certa pri tio, kion Vi faras.

— Sendube, S-ro Langernaut. Tute vere mi ne intencas vin erarigi aŭ okazigi al vi embarason, sed se mi devas esti certa pri io, estas nepre pri tio ĉi : mi havas nur unu infanon !

Pasis kelkaj momentetoj, dum kiuj la personarestro pripensis kaj poste diris : « Laŭ admi nistra vidpunkto tiu ĉi fakto estas ĝenanta, tre ĝenanta — Necesos reguligi !

— Reguligi ! ? S-ro Langernaut, komprenéble Vi ne serioze diras tion !... Ŝajnas, ke almenaŭ bone estus, ke mi avertu mian edzinon !

— Le Gall, kiam mi diras : reguligi, mi ne volas igi vin al kontribuado. Mi mem prenos sur min la aferon.

Mia koro eksaltis en mia brusto, mia sango ekbatis ĉe miaj tempioj ; mi serĉis mian spiron.

Denove Li parolis : Bone komprenu min : se efektive vi havas nur unu infanon, mia kara, ne estas via kulpo ; sendube estas eraro.

Alo ! Le Gall ĉu vi aŭdas min ?

Sed, konsentu ke, se vi havus 2 infanojn, oni estus certaj, ke la Maŝino normale funkcias ! ».

Pasis momento, kiam li devis pensi, ke li mortigis min.

« Alo ! Alo ! Le Gall ? Ĉu vi estas tie ? Ah ! bone. Mi estas dirinta : oni tuj ekzamenos, kion oni povos fari por tiu dua infano. Per voĉo malklara mi sugestis, ke eble ĝi ne estas mia, sed ke, sendube, unu el miaj kolegoj troviĝas elektrone senigita je la tenereco de unu el siaj karuloj.

Li respondis, ke neniu ĝis nun, konigis al li tian fakton. Oni akceptu la evidentecon : la sola « komputilo » kulpas pri tiu mistera patreco.

Eltiri infanon el « komputilo » estas entrepreno, kiu postulas manan lertecon tute neordinaran kaj grandan sentimento-delikatecon.

Miksita al la multaj sciigoj, kiujn oni petis de mi, por ke ĉiu trankvile vivu en Maŝino, tiu senpeka, sed maloportuna eta estaĵo estis travivinta feliĉajn tagojn apud mia edzino, ek de la dato de mia eniro en tiun Societon, tute ne konsciante la danĝeron, kiu Ĝin minacis. Pro ilia abundo la

signoj + kaj — kiuj Ĝin afliktis, montris la ekstreman malfortecon de ĝia konstituo.

Unuatempe oni provis eligi la infanon, ne domaĝante la integralecon de mia familio nek la harmonion de mia metia vivo. 4 signoj — kaj unu signo + konstituis la etulon. Plej zorge oni procedis al eltiro de tiuj signoj. Skandala renverso okazis : liberigitaj la + kaj la — sin pelis por plenigi la malplenon lasitan post la operacio.

Mia ekzistado tute alia aperis : akuzita de militista dizerto, mi montriĝis ankaŭ kiel oficisto kun dubinda moraleco. Eĉ oni malkovris en mia familio tiajn edziĝojn, pri kiaj oni ne fanfaronas. Tamen alia provo finfine formalaperigis tiun infanon. Sed en la sama momento naskiĝis al mi 9 999 aliaj etaj anĝeloj. Mia edzino (sendube tute malfortigita) estis fraŭde forlasinta la Maŝinon.

S-ro Langernaut, Ĝenerala Direktoro restis perpleksa.

Saĝe oni decidis reekzameni la aferon jam de la komenco.

Mi reiris al fraŭleco : la « komputilo » pro kontenteco ronronis. Mi reedziĝis kun mia edzino, kiun oni estis jus trovinta en la lito de la librotenanto. Ŝi renaskis nian etulineton (kvazaŭ tio estis plej natura fenomeno). Mi retrovis mian honestecan viro-staton (kiu ne estas devigata ruĝi pro sia malbona konduto).

S-ro Langernaut, reirigante min al miaj kalkuloj patrece premis al mi la manon.

Vespere, siblante laŭmodan arion, mi reiris hejmen. Mi sentis min kvazaŭ liberigita je pezilo.

Mia edzino akceptis min kun io ajn en la rigardo, kiu al mi diris nenion bonan. Vane mi provis memori, kiam mi jam vidis ŝin kun tia mieno. Ni, kaŝite, reciproke rigardis nin kaj mi kaptis je ŝi rideton, kiu plifortigis mian malkvieton. Tamen mi prenis mian jurnalon. Ŝi eltiris ĝin el miaj manoj, rigardis min plej profunden en miaj okuloj kaj diris « Mia karulo, ĉu ne plejbone estas, ke tion ĉi vi scias jam de nun : eh ! finfine... mi volas diri... mi esperas, ke estos knabo !...

★

## 10-a PASKA KULTURA SEMAJNO EN GRESILLON

De la dimanĉo, 4-an de aprilo, ĝis la vendredo 9-an, vespere, okazos en la kastelo de Grésillon, apud Baugé (Francujo), la 10-a Paska Kultura Semajno.

Studentoj de Profesoro Janton, de la Fakultato de Clermont-Ferrand, kaj de Profesoro Duc-Goninaz, de la Fakultato de Aix-en-Provence, kaj eksterlandaj studentoj estas invititaj.

Federacioj kaj grupoj povas sendi staĝanojn ; izoluloj povas aliĝi petante la kondiĉojn al S-ro René Llech-Walter, 5, quai Vauban, Perpignan.

Speciala fonduso estas kreita. Oni povas sendi la donacojn, ĉu al U.F.E. (Union Française pour l'Esperanto), 34, rue de Chabrol, Paris ; poŝtĉekkonto : 855-35 Paris, ĉu al S-ro Pierre Babin (Direktoro de la Kulturdomo de Grésillon), 13, boulevard de la Chauvinière, Nantes ; poŝtĉekkonto : 2.813-61, Nantes.

Ne forgesu aldoni ĉe la korespondа kupono : « Fonduso : 10-a Paska Kultura Semajno ». Dankon !

# POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1970-1971

**Rimarko :** Ĉar la antaŭa numero de Kulturaj Kajeroj (n° 5, septembro-oktobro) iom malfrue aperis, vi rajtos sendi la rezultojn kune kun tiu de ĉi-tiu numero. Senmanke sendu viajn solvojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun dum kiu vi ricevis la gazeton.

Dankon ! P. Chevalier.

**UNUA PROBLEMO :** (20 poentoj)

El la ĉisubaj frazoj, kelkaj estas korektaj, kelkaj ne. Korektu la nekorektajn. Estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu frazo ĝuste korektita, sed estos forprenitaj po 1 poento por ĉiu malbona korekto.

1) Mi volis ŝlosi la pordon, kaj mi perdis la ŝlosilon.
2) Se mi estus sana, mi estus feliĉa.
3) Mi renkontis nek lin, nek sian fraton.
4) Mi amas nenian urbon.
5) Jam estas tempo iri dome.
6) Mallarĝa vojeto kondukas trans tiun ĉi kanejo al mia domo.
7) Rigardu kiom multope jam aliĝis al ni la Britoj, kiuj tiel nevolonte lernas aliajn lingvojn krom sia nacia.
8) Ni manĝas kun la buŝo kaj flaras kun la nazo.
9) La pli bela el ĉiuj infanoj...
10) Anstataŭ kafo, li donis al mi teon.
11) Promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radoj de veturanta vagonaro, kaj mortigis.
12) La malfeliĉulo dronis ! Li tamen ne sin dronigis, ĉar oni lin dronigis, li droniĝis de la nekonata mortiganto.

**DUA PROBLEMO** (10 poentoj)

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 73 literoj, kiuj estas numeritaj. Jen la ŝlosilvortoj :

52 53 4 16 59 7 61 2 26 19 = ŝtato en Usono.
13 28 25 8 22 20 34 18 21 = angla havenurbego.
33 11 35 37 36 48 47 6 30 = sudamerika lando.
39 40 58 57 10 42 72 73 3 41 44 = scienco pri la birdoj.
15 60 70 1 46 62 = rajdbesto.
54 5 43 49 38 45 64 = antikva ĉefdio.
68 67 65 63 17 29 10 16 = prilabori lignon.
52 14 27 5 9 69 23 51 = turniĝanta amuzilo.
12 24 31 32 54 50 7 = perioda laborpago.
52 56 9 17 22 19 55 21 = metala kuirilo.
71 66 26 36 1 38 30 27 39 = amerika krokodilo.

1—73 **malnova itala diraĵo kun tre strangaj asertoj pri unu eŭropa lando.**

AMUZAJ **PROBLEMOJ** (apartaj de la konkurso)

Solvo de la problemo aperinta en la antaŭa numero :


**Kaŝita proverbo**

La difinoj donis la jenajn vortojn : 1 : Limako, 2 : Vulpoj, 3 : Saliko, 4 : Kodako, 5 : Enhavi, 6 : Tavolo, 7 : Homaro, 8 : Kulpoj, 9 : Bolido, 10 : Cidaro, 11 : Bezoni, 12 : Forges, 13 : Alojoj. Kaj la proverbo estis : Malpli da havo, malpli da zorgoj.

**La pilko-ludo**

La tri ciferoj donas la sumon de la « valoroj » de la diversaj pilkoj kiuj estas respektive en la tri kolonoj.

Kiu estas la « valoro » de ĉiu speco de pilko ?



# GRAMATIKO PER BONHUMORO

— Cirkonstanca tempo-komplemento
Oni esprimas ĝin pere de prepozicio, akuzativa formo, adverbo.



— Kial vi estas tiel malbonhumora la unuan de Januaro ?



— Permesu al mi Marinjo : je ĉiu fojo, kiam la horloĝoj sonoros, ni trinkos al la nova jaro. kaj ĉiufoje mi petos de vi kison.



— Certe la sablo-horloĝo estas ŝtopita ; jen tagiĝas kaj ĝi montras ke estas nur la duono antaŭ nulo de la nova jaro.

# Niaj perantoj

**Aŭstrio :** S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
**Belgujo :** S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
**Britujo :** S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
**Ĉeĥoslovakio :** S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
**Danlando :** S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
**Finnlando :** S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
**Germanujo Okc. :** S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
**Hispanujo :** S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
**Italujo :** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
**Japanujo :** S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
**Jugoslavio :** Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
**Nederlando :** S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
**Norvegujo :** S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
**Peruo :** S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
**Pollando :** Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).
**Rumanio :** S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).
**Svedujo :** S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
**Svislando :** S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
**Tajlando :** S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
**Usono :** S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
**Aliaj landoj :** Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.




# KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis **septembro ĉiulandajn esperantistojn** kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

***Akceptas :***

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi **kulturajn prelegojn** ;
Por studi specialajn **problemojn** ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## *VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO*

**Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :**
**ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ** (Maine-et-Loire) Francujo



Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier  Le Gérant : P. BABIN.

*Supplément au n° 6 de 1970, de « KULTURAJ KAJEROJ »*

# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...

Notre Conseil d'Administration d'octobre a fixé le programme de notre saison 1971. Le compte rendu vous signalera les quelques modifications apportées. Je voudrais simplement dire pourquoi nous avons fait ces aménagements de programme.

Depuis déjà plusieurs années nous avions remarqué que le mois d'août est surchargé alors que le mois de juillet n'amène pas assez de participants. D'autre part certains amis nous écrivaient pour nous dire : « Le programme d'août nous plait mais nous ne sommes libres qu'en juillet ». Nous avions hésité jusquà maintenant à rompre la tradition. Les circonstances ont cette année donné le coup de pouce nécessaire. La semaine du post-Kongreso de SAT ne pouvant avoir lieu que du 8 au 14 août, les « semaines espérantistes et culturelles », ces trois semaines qui créent des problèmes de logement au mois d'août ne pouvaient plus se placer à l'époque habituelle. Cela nous donnait l'occasion de préparer deux périodes semblables quant au programme. Pendant les trois premières semaines de juillet ceux qui jusqu'à maintenant n'ont pas pu assister à la période qui leur aurait plu trouveront les trois cours avec préparation aux examens et des activités annexes : vannerie, reliure et émaux. Si certains amis sont intéressés, nous pourrons ajouter quelques cours de pédagogie des langues vivantes. Les trois semaines du 15 août au 5 septembre offriront le programme habituel. Nous espérons que cette expérience qui gênera peut-être quelques habitués du découpage habituel, permettra à de nombreux « vacanciers de juillet » de profiter d'activités plus nombreuses, et aux stages eux-même d'être mieux équilibrés. Nous verrons l'an prochain si nous avons eu raison.

Le bilan financier provisoire a montré que les dépenses de l'été ont subi une forte augmentation. Cela nous a amenés à augmenter le prix de pension. Nous espérons que nos amis nous comprendrons. Grésillon ne doit pas être, au détriment de son développement, un centre de vacances à bon marché. Par contre, la MCE doit, fidèle à ses buts, rester le lieu où tous les espérantistes peuvent se rencontrer, et pour cela elle doit permettre au plus grand nombre de faire face aux frais de séjour. Nous pensons que les nouveaux prix répondent à ce souci.

Notre programme sera imprimé lorsque ces lignes paraîtront. Inscrivez-vous vite car nous avons déjà reçu un assez grand nombre de demandes de renseignements.

P. BABIN.

# Conseil d'Administration du Dimanche 18 Octobre 1970

La séance est ouverte à 10 h. sous la présidence de M. Babin. Sont présents : Mmes et MM. Babin ; Bodereau, Boyet, Cheverry, Ciret, Coussé, Dairon, Guillot, Jacquesson, Jelenc, Levrard, Mathé, Métivier, Micard.

Se sont fait excuser : MM. Chevalier, Benazet, Benistant, Thierry, Vazon.

Le président fait connaître le désir de Mlle Vazon d'être rayée de la liste des membres du conseil d'administration. Le C.A. se prononce à l'unanimité pour le maintien de Mlle Vazon.

**EXAMEN DE L'ORDRE DU JOUR**

**STAGES 1969 :**

Il n'y a pas eu de passage de la F.O.L. durant l'été. Mme Cheverry demande si le catalogue de vacances FOL est paru. M. Boyet demandera à la FOL si le catalogue paraîtra cette année encore avec l'adresse de la MCE et s'il sera possible d'emprunter ou d'acheter du matériel. M. Cheverry précise qu'un grand placard est paru dans JIP. La revue devrait paraître vers février-mars.

**Juillet : stage dirigé** par Mme Cheverry : environ 35 participants de 25-30 ans de moyenne d'âge. Bilan positif tant sur le plan de l'animation que des cours organisés par MM. Thierry, Ribot, Mme Vincent. Les professeurs stagiaires sont heureux d'acquérir l'expérience qui leur manque pour guider un cours.

**Semaines internationales** (J.-P. et J. Guillot). La moyenne d'âge assez élevée explique peut-être le grand nombre de participants aux conférences et leur manque d'intérêt pour la concrétisation des ateliers théâtre et marionnettes.

**Le 3e stage** (Mme Cheverry) se déroulait pendant le Congrès de Vienne ; il y avait beaucoup de participants non-espérantistes qui ne connaissaient pas l'esprit de Grésillon, ce qui a posé quelques problèmes sur le plan de la vie collective. Par contre le niveau des élèves était bon selon M. Ribot.

Dans l'ensemble Juillet 1970 fut meilleur que 1969.

**Août :** ont eu lieu les trois semaines traditionnelles avec 110 participants. MM. Babin et Dairon affirment que ce stage fut différent de celui de 1969 par l'ambiance pour deux raisons : le manque d'unité des jeunes qui rendait l'animation des soirées difficiles et, la grande différence entre les niveaux de connaissance de la langue. Peut-être aussi un plus grand « esprit vacances ».

**Septembre :** M. Mme Ciret ont eu peu de participants ; mais ces derniers ont été plus exigeants pour la nourriture.

L'organisation matérielle de la saison n'a pas posé de problèmes majeurs ; cependant certains responsables de stages ont eu à se plaindre du gaspillage de quelques cuisiniers qui ont par ailleurs donné entière satisfaction sur le plan professionnel. Le problème de la présence de la famille du cuisinier à la cuisine a été évoqué.

**SITUATION FINANCIERE :**

Bilan provisoire au 1er octobre.

| | |
|---|---|
| Caisse .................. | 863,14 frs |
| C.C.P. .................. | 26 560,63 frs |
| Banque .................. | 15 220,41 frs |
| **Soit** | **42 664,18 frs** |

M. Coussé dispose en outre de 5 622 frs à la Caisse d'Epargne et de 3 879 frs au C.C.P. M. Babin indique que depuis cette date le dernier versement (dû au 1/1 d'ordinaire) a été fait à Mlle Schirber ; il fait remarquer qu'en outre toutes les factures d'alimentation ont été payées avant le 1/10 ; il reste à payer environ 6 000 frs pour les travaux de la cuisine en janvier.

Le bilan des recettes de l'été fait apparaître un accroissement des recettes de séjour de 4 000 frs par rapport à 1969 (77 157,79 frs). Parallèlement les dépenses se sont elles aussi accrues : augmentation des charges sociales et des salaires ; emploi d'une personne en trop en août, paiement à l'heure de Mme Corvaisier. Il y a environ 45 000 frs de dépenses pour 77 000 frs de recettes.

**PROGRAMME 1971 :**

**Noël 70 :** René Jelenc demande à occuper le M.C.E. du 24 au 31 décembre avec 25 ou 30 personnes. Le principe est accepté aux conditions suivantes ; minimum absolu 25 personnes pendant 7 jours ; 150 frs par personne + les boissons ; paiement en totalité au 10-12 au plus tard. Administration : J.-P. et J. Guillot.

15 au 28-3 : stage P. et T. Adm. M. Coussé, M. Mme Cheverry.

4 au 9-4 : stage U.F.E., semaine culturelle. Adm. M. Mme Bodereau ; Mme Micard.

9 au 16-4 : cours : M. Ribot. Adm. M. Jelenc ; M. Babin.

Pentecôte : U.P. M. Mme Ciret.

3 au 14-7 : semaines culturelles : Adm. M. Mme Babin.

24-7 au 7-8 : quinzaine internationale. Adm. J.-P. et J. Guillot.

7 au 14-8 : S.A.T. Adm. M. Mme Babin.

15-8 au 5-9 : semaines culturelles. Adm. M. Mme Cheverry ; M. Mme Ciret.

**PRIX DES SEJOURS :**

Compte tenu de l'augmentation des prix, les tarifs de séjours sont fixés comme suit :

| | Plus de 3 jours | Moins de 3 jours |
|---|---|---|
| Ch. Part. : | 25 frs | 29 frs |
| Ch. Fam. : | 21 frs | 26 frs |
| Box : | 20 frs | 25 frs |
| Dortoir : | 17 frs | 22 frs |
| Campeurs : | 16 frs | 19 frs |
| de 2 à 6 ans : | 12 frs | 15 frs |
| de 0 à 2 ans : | 4,50 frs | 6,50 frs |

Prix du repas : 10 frs.

**QUESTIONS DIVERSES :**

M, Métivier établira un plan d'ensemencement du jardin.

Problème de l'écoulement des eaux usées : après lecture du devis fourni à M. Babin par M. Covaisier pour la pose de décanteurs et la construction de puisards, il est décidé de faire exécuter dans l'immédiat la moitié des travaux (3 fosses + le décanteur de la cuisine).

L'ordre du jour étant épuisé la séance est levée à 17 h. 30.

## NOS PEINES

Notre fidèle lectrice Gisela Braun, de Frankfort, qui avait fait un séjour à Grésillon, est décédée victime d'un rôdeur.

A sa famille, à ses amis, La Maison Culturelle et Kulturaj Kajeroj présentent leur profonde sympathie.

## EXAMENS 1970
(suite)

**Atesto pri Kapableco :** Guillaume Michel, Guillon Jean-Marie, Hervieu Dany, Le Magadure Evelyne, Poisson Jean, Pons Raymond, Ducrocq Julien.

**Atesto pri Supera Lernado :** Golden Bernard, Altherr Hans, Massé Anita, Clopeau Denis, Villeneuve George.

**Atesto pri Lernado :** Altherr Hans, Golden Bernard, Grossi Marcelle, Naud Marie-France, Villeneuve Jacqueline.

## PHILATELISTES

Nous avons encore quelques séries de timbres neufs de Roumanie. Nous vous les offrons avec 50 % de réduction sur les prix du catalogue Yvert. Adressez 10, 20, 30, francs à :

M. Giloteaux, 3, allée Béranger, 59 - CROIX
C.C.P. Lille 2 269 89

## LIBRO -SERVO

Notre Libro-Servo tient à votre disposition le livre qu'il vous faut et en particulier

PLENA ILUSTRITA VORTARO
(eldonita de SAT)
1.344 pages — format 148 × 210
reliure solide
145,00 francs, frais d'envoi compris

## LA REVUE

A la suite du rappel porté sur la bande du dernier numéro de Kulturaj Kajeroj, nombreux sont les amis qui ont régularisé leur situation. Quelques uns ne l'ont pas encore fait. Nous leur demandons de faire vite car nous ne pourrions pas leur servir les numéros à venir. N'oubliez pas que Kulturaj Kajeroj vous apporte non seulement des lectures simples et variées mais aussi des nouvelles de Grésillon, et que, grâce à la revue, la MCE est de plus en plus connue dans le monde entier. En vous abonnant, en faisant abonner vos amis, non seulement vous vous procurez un plaisir, mais vous aidez indirectement la MCE.

## Abonnements bienfaiteurs 1970
(suite)

| | |
|---|---|
| M. Mathé (86) | 15,00 |
| M. P. Jacquesson (72) | 15,00 |
| Mlle Levrard (72) | 15,00 |
| M. Bodereau (72) | 15,00 |
| M. Rabineau (41) | 15,00 |
| M. Bénazet (66) | 15,00 |
| M. Tissot (42) | 15,00 |
| Mme Gimel (14) | 15,00 |
| Mlle Prigent (45) | 15,00 |
| M. Melo (42) | 15,00 |
| M. Moitron (63) | 15,00 |
| M. Kubler (68) | 15,00 |
| M. Serre (66) | 15,00 |
| M. Romero (Espagne) | 15,00 |
| M. Svoboda (Tchéco.) | 15,00 |
| M. Dairon (86) | 15,00 |
| M. Cellier (42) | 15,00 |
| Mme Rouquet (78) | 15,00 |
| Mlle Moreau (69) | 15,00 |
| **TOTAL :** | **290,00** |

## Abonnements bienfaiteurs 1971
(suite)

| | |
|---|---|
| Mme Jacquesson (86) | 15,00 |
| M. Jelenc (86) | 15,00 |
| Mme Asao (Japon) | 15,00 |
| M. Flejs (U.R.S.S.) | 15.00 |
| M. P. Jelenc (U.S.A.) | 15,00 |
| Mme Micard (53) | 15,00 |
| M. J. Micard (14) | 15,00 |
| M. Vizgirdas (U.R.S.S.) | 15,00 |
| M. P. Jacquesson (72) | 15,00 |
| M. Coussé (72) | 15,00 |
| M. Bodereau (72) | 15,00 |
| M. Schicke (R.F.A.) | 15,00 |
| M. Métivier (49) | 15,00 |
| Mlles Vazon (79) | 30,00 |
| Mlle Prigent (45) | 15,00 |
| M. Fourreau (69) | 15,00 |
| M. Kuhn (R.F.A.) | 15,00 |
| Mlle Kholer (25) | 15,00 |
| Mlle Louys (25) | 15,00 |
| M. Genuit (10) | 15,00 |
| M. Friedlander (92) | 15,00 |
| Mme Eyssautier (69) | 15,00 |
| M. Gimbert (63) | 15,00 |
| M. Kraemer (78) | 15,00 |
| Mlles Kraemer (68) | 15,00 |
| M. Doury (75) | 50.00 |
| M. Dairon (86) | 15,00 |
| M. Cellier (42) | 15,00 |
| **TOTAL :** | **470,00** |

**VOUS POUVEZ COMMANDER**

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

**MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE**
**49 - Baugé**
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

**POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT**

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ**
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

**NOTRE PROGRAMME 1971**

—

**A PAQUES :**

(4-9 avril)

10e Semaine Culturelle de U.F.E.

—

**PENDANT L'ETE :**

(3-24 juillet) :
**Semaines d'études espérantistes**

(24 juillet - 7 août) :
**Quinzaine internationale**

(7-14 août) :
**Postcongrès S.A.T.**

(14 août - 5 septembre) :
**Semaines d'études espérantistes**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

**Cours 1er degré.** — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 2e degré.** — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 3e degré.** — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.